

«Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue» - Paolo VI

# KATOLIKA PENSO

N. 2 - dicembre 2023





Filippo Lippi  
*Madonna col bambino e due angeli*

Katolika Sento n. 11/1970

## MIA PREĜO LA MIA PREGHIERA

Luigi Minnaja

Dia Infano, mia beltrezoro,  
dum vintra nokto stela kaj malvarma  
ame Vi venis de l'ĉiela gloro  
al tiu ĉi mizera valo larma  
por porti al la homoj de bonvolo  
mesaĝon pleje dolĉan de konsolo.

Sinjoro, ĝemas mia kor' dolore.  
Al Vi leviĝas mia preĝ fervore!

Ĉe l'mondo regas nur malam', perforto;  
fariĝis homo por la hom' kruela,  
timige premas danĝerplena sorto  
sur la popolo laca, senribela;  
el lupoj ŝajne iĝis la homaro  
pro mordad' kruela, sangavida faro.  
Sinjoro, ĝemas mia kor' dolore.  
Al Vi leviĝas mia preĝ fervore!

Ĉesigu la malfidon ĉe la popolo,  
estigu la konkordon inter homoj:  
paco kaj amo estu la simboloj  
de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj domoj.  
Vivu la mondo sankte en sereno,  
al ĝi konsolon donu Via beno.  
Sinjoro, ĝemas mia kor' dolore.  
Al Vi leviĝas mia preĝ fervore!

Divino Bambino, mio bel tesoro,  
nella invernale notte stellata e fredda  
amorevolmente Tu sei venuto dalla gloria celeste  
in questa misera valle piangente  
per portare agli uomini di buona volontà  
un messaggio più dolce della consolazione.

Signore, geme il mio cuore con dolore.  
A Te si eleva la mia preghiera con fervore!

Nel mondo domina solo odio, violenza;  
l'uomo è diventato crudele verso l'uomo,  
preme spaventosamente un destino pieno di  
pericoli sul popolo stanco, sottomesso;  
sembra che dai lupi derivi l'umanità  
per i morsi crudeli, per l'agire sanguinario.  
Signore, geme il mio cuore con dolore.  
A Te si eleva la mia preghiera con fervore!

Fai cessare la diffidenza presso i popoli,  
suscita la concordia fra gli uomini:  
pace e amore siano i simboli  
di tutte le terre e di tutte le case.  
Che il mondo viva santamente nella serenità,  
che la Tua benedizione gli doni consolazione.  
Signore, il mio cuore geme con dolore.  
A Te si eleva la mia preghiera con fervore.

# La humanigo de la Filo de Dio

L'umanizzazione del Figlio di Dio

Aŭtoro: Don Salvatore Rinaldi

Esperantigis: C. Sarandrea

La unuaj ricevantoj de la granda anonco pri la naskiĝo de Kristo estas la paŝtistoj. Fakte, devigitaj de sia laboro havi nomadan vivon, laŭ la tiutempa religia kulturo ili estis taksitaj malpuraj homoj; sekve, ili estis ekskluditaj el la oficiala liturgia vivo: tamen, ĝuste al tiuj malriĉaj, marĝenigitaj kaj malestimataj homoj direktiĝas la prefero de Dio, kiu elektas ilin por fari “sian” historion.

Tiu ĉi signo, tiom ĉiutaga kaj tute ne eksterordinara, montras, al tiuj, kiuj kapablas ĝin akcepti, ke la gloro de Dio estas skandala gloro, tre malsama ol tiu, kiun ni homoj imagas: ĝi estas la gloro de la humileco, de la humiliĝo... Ĝi estas la tre humaneca realaĵo de vindita ĵusnaskito, kiu estas meze de siaj gepatroj.

Jen, tiel montriĝas, ke Jesuo estas la Savanto, la Mesio, la Sinjoro: en infano malakceptita jam en la ventro de sia patrino, ĉar “ne estis loko por ili en la gastejo” (*Luk 2,7*); en novnaskita bebo ankoraŭ vindita, bildo de la senpoveco kaj la dependo de aliaj, kiu karakterizas nian homan kondiĉon; en infano metita en la lokon, kie manĝas bestoj. La paŝtistoj siavice iĝas anoncantoj, “ili raportas tion, kion oni diris al ili pri la infano”.

La teksto laŭvorte diras, ke ili “konigas” tion, kion antaŭe oni “konigis al ili”. Ili fariĝas atestantoj, ili ne restas simplaj spektantoj de novaĵo.

Sed ĝi estas la sperto de la kredo, kiun ĉiu el ni estas vokata havi en sia kristana vivo: sperto, kiu ne estas la akiro de io plia ol la anonco transdonita al ni, sed kiu igas nin pli konvinkitaj kaj fidindaj anoncantoj de la “Eterna Evangelio” (*Apo 14,6*).

I primi destinatari del grande annuncio della natività sono i pastori. Essi, infatti, costretti dal loro lavoro a una vita di nomadismo, per la cultura religiosa dell'epoca erano persone impure e quindi escluse dalla vita liturgica ufficiale: eppure proprio a questi poveri, emarginati e disprezzati va la predilezione di Dio, che li sceglie per fare la “sua” storia.

Questo segno così quotidiano e per nulla straordinario manifesta, a chi sa accoglierlo, che la gloria di Dio è una gloria scandalosa, ben diversa da quella che immaginiamo noi uomini: è la gloria dell'umiltà, dell'abbassamento... È la realtà umanissima di un neonato in fasce, tra i suoi genitori.

Ecco come si manifesta che Gesù è il Salvatore, il Messia, il Signore: in un bambino rifiutato già nel grembo di sua madre perché “non c'era posto per loro nel caravanserraglio” (*Lc 2,7*); in un neonato ancora in fasce, figura dell'impotenza e della dipendenza dagli altri che contraddistingue la nostra condizione umana; in un bambino deposto nel luogo dove mangiano gli animali. I pastori diventano a loro volta annunciatori, “riferiscono ciò che del bambino era stato detto loro”.

Il testo dice letteralmente che essi “fanno conoscere” ciò che prima è stato “fatto conoscere loro”. Diventano testimoni, non restano semplici spettatori di un fatto di cronaca.

Ma questa è l'esperienza di fede che ciascuno di noi è chiamato a fare nella propria vita cristiana: un'esperienza che non è acquisizione di qualcosa di ulteriore rispetto all'annuncio a noi trasmesso, ma che ci rende annunciatori più convinti e affidabili del “Vangelo eterno” (*Ap 14,6*).



## Renkontiĝo en Oropa

kaj la Sanktaj Montoj

Aŭtorino: T.Fossati

Esperantigis: F.Fagnani

Sunoplena kaj varma tago akceptis en Oropa la grupon de esperantistoj de klubo “Mario Sola” de Verĉelo. En tiu ĉi renkontiĝo partoprenis ankaŭ mi por ekkoni la geamikojn de la klubo kaj por renkonti kelkajn niajn anojn kaj simpatiantojn.

La 7-a de Oktobro komenciĝis per la vizitoj al la Malnova Baziliko, kie troviĝas la statuo de la Nigra Madono, al la Supra Baziliko kaj al la ekspozicio de la kripoj. Post gustumo de maizkaĉo nomata “konĉa”, tradicia norditala manĝaĵo, ni vizitis la Sanktan Monton. La ĉiĉerono kaj la aktorino, kun kostumo, preciza kopio de tiu de unu el la statuoj de la kapelo, akompanis nin en emociplena vojaĝo. La vojo disvolviĝas en la arbaro kie, en la dekdu kapeloj, ni povis admiri la belegajn statuojn el terakoto laŭ reala grandeco, kreitajn de tiutempaj artistoj. Esceptokaze oni malfermis la pordojn de iuj kapeloj konstruitaj inter la jaroj 1620 kaj 1720. La verĉela grupo volis tiamaniere rememori la 20-an datrevenon de la enlistigo de la “Sanktaj Montoj de Piemonte kaj Lombardio” en la Liston de la Mondaj Heredaĵoj.

Una soleggiata e calda giornata ha accolto a Oropa il gruppo di esperantisti della sezione di Vercelli “Mario Sola”. A questo incontro ho partecipato anch’io per conoscere gli amici della sezione e incontrare alcuni nostri soci e simpatizzanti.

La giornata del 7 ottobre è iniziata con le visite alla Basilica Antica, dove si trova la statua della Madonna Nera, alla Basilica Superiore e alla mostra dei presepi. Dopo aver gustato la polenta concia, un piatto tradizionale del Nord Italia, abbiamo visitato il Sacro Monte. La guida e la teatrante, con un costume riprodotto fedelmente da una delle statue della cappella, ci hanno accompagnato in un emozionante viaggio. Il percorso si snoda nel bosco dove, nelle dodici cappelle, abbiamo potuto ammirare le magnifiche statue in terracotta a grandezza naturale, frutto di artisti dell’epoca. Eccezionalmente sono state aperte le porte di alcune cappelle costruite tra il 1620 e il 1720. Il gruppo di Vercelli ha voluto, così, ricordare il ventesimo anniversario dell’iscrizione dei “Sacri Monti del Piemonte e della Lombardia” nella Lista del Patrimonio Mondiale.

En 2003 Unesco enskribis la “Sanktajn Montojn de Piemonte kaj Lombardio” en la Liston de la Mondaj Heredaĵoj kun la jena motivaĵo: “La naŭ Sanktaj Montoj de norda Italio estas aroj de kapeloj kaj de aliaj arkitekturaj elementoj starigitaj inter la fino de la 15-a kaj la komenco de la 18-a jarcento, dediĉitaj al diversaj aspektoj de la katolika fido. Krom ilia simbola spirita signifo, tiuj ĉi lokoj donas mirindan ekzemplon de integriĝo de arkitekturaj elementoj en la ĉirkaŭaj pejzaĝoj, dissemataj per montetoj, arbaroj kaj lagoj; krome, ili entenas elstaran artan havaĵon sub formo de skulptaĵoj kaj freskoj”.

La konstruo de la unuaj Sanktaj Montoj komenciĝis en Eŭropo dum la 15-a jarcento. Post la falo de Konstantinopolo fare de la Otomanoj (1453) ne plu eblis organizi pilgrimojn al la Sankta Lando. Atingi Jerusalemon iĝis malfacile, multekoste kaj danĝere, do la Eklezio enkondukis la tiel nomatajn “anstataŭigajn praktikojn”: pilgrimoj, sole aŭ grupe, al sanktejoj kaj sanktaj lokoj.

La franciskana frato Bernardino Caimi el Milano havis la ideon reprodukti la plej signifajn lokojn de la Sankta Lando. La baziliko situis kutime sur pinto de supreniro kaj estis la alvenpunkto de etapvojo markita per diversaj kapeloj aŭ haltejoj dediĉitaj al la vivo kaj al la pasio de Jesuo, al la vivo de la Madono, al la misteroj de la Rozario, al la Triunuo aŭ al la vivo de iu sanktulo. Statuoj same grandaj kiel veraj homoj, kun gestoj, fizionomioj kaj esprimoj de granda realeco popolis la kapelojn. Ili estis verkoj de famaj lokaj artistoj, kiuj utiligis lignon kaj terakoton. Dum la sekvaj jaroj, la Sanktaj Montoj iĝis lokoj en kiuj la fideluloj sekvus vojon de meditado kaj preĝado.

Hodiaŭ la statuoj, la vestaĵoj kaj la perukoj kiuj ilin kovras, la mebloj, la bestoj kaj la aĵoj uzataj de la homoj reprezentataj en la kapeloj de la Sanktaj Montoj estas por ni eksterordinaraj dokumentoj de tiu historia periodo. La vestaĵoj, la ŝuoj kaj la objektoj

Nel 2003 l’Unesco ha iscritto i “Sacri Monti del Piemonte e della Lombardia” nella Lista del Patrimonio Mondiale con questa motivazione: “I nove Sacri Monti dell’Italia settentrionale sono gruppi di cappelle e di altri elementi architettonici eretti fra la fine del XV e l’inizio del XVIII secolo, dedicati a vari aspetti della fede cattolica. Oltre al loro significato simbolico spirituale, questi complessi offrono uno splendido esempio di integrazione degli elementi architettonici nei paesaggi circostanti, disseminati di colline, foreste e laghi; inoltre racchiudono un notevole patrimonio artistico in forma di scultura e affreschi”.

La costruzione dei primi Sacri Monti ebbe inizio in Europa nel XV secolo. Dopo la caduta di Costantinopoli nelle mani degli Ottomani (1453) non fu più possibile organizzare pellegrinaggi verso la Terra Santa. Raggiungere Gerusalemme era diventato difficile, costoso e pericoloso e così la Chiesa introdusse le cosiddette “pratiche sostitutive”: pellegrinaggi, da soli o in gruppo, verso santuari o luoghi sacri.

Il frate francescano Bernardino Caimi da Milano ebbe l’idea di riprodurre i luoghi più significativi della Terra Santa. La basilica era situata solitamente sulla sommità di una salita ed era il punto d’arrivo di un percorso a tappe segnato da diverse cappelle o stazioni dedicate alla vita e alla passione di Gesù, alla vita della Madonna, ai misteri del Rosario, alla Trinità o alla vita di un santo. Statue grandi come persone vere, con gesti, fisionomie ed espressioni di grande realismo popolavano le cappelle. Esse erano opera di famosi artisti dei luoghi che utilizzarono legno e terracotta.

Negli anni seguenti, i Sacri Monti divennero luoghi in cui fedeli facevano un percorso di meditazione e preghiera.

Oggi le statue, gli abiti e le parrucche che le ricoprono, gli arredi, gli animali e gli oggetti usati dai personaggi rappresentati nelle cappelle dei Sacri Monti sono per noi degli straordinari documenti di quella realtà storica. Gli indumenti, i calzari e gli accessori che

kiuj kovras la statuojn estas ofte fidelaj reproduktaĵoj de la manieroj kaj de la tipoj de vestaĵoj uzataj tiuepoke.

La Sanktaj Montoj agnoskitaj de Unesco estas naŭ. En Piemonto ili troviĝas en Varallo, en Crea, en Orta, en Oropa, en Ghiffa, en Domodossola, en Belmonte. En Lombardio du estas la sanktaj montoj: Varese kaj Ossuccio.

ricoprono le statue sono spesso delle fedeli riproduzioni delle mode e delle fogge di abbigliamento in uso all'epoca.

I Sacri Monti riconosciuti dall'UNESCO sono nove. In Piemonte si trovano a Varallo, a Crea, a Orta, a Oropa, a Ghiffa, a Domodossola, a Belmonte. In Lombardia due sono i sacri monti: Varese e Ossuccio.



Adorado de la paŝtitoj- Sankto Monto de Varallo  
[www.sacrimonti.org/sacro-monte-di-varallo/](http://www.sacrimonti.org/sacro-monte-di-varallo/)

La CENTRA KOMITATO de UECI kaj la REDAKCIO de KATOLIKA PENSO  
 bondeziras al ĉiuj

## BONAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON

“... tiu Infaneto, kiun ni kuŝigas en la kabano aŭ en la grotto, estas la centro de ĉio, estas la koro de la mondo. Ni preĝu por ke ĉiu homo, kiel la Virgulino Maria, povu akcepti kiel centron de sia vivo Dion, kiu fariĝis Infano, fonto de vera ĝojo.”

“... quel Bambinello, che mettiamo nella capanna o nella grotta, è il centro di tutto, è il cuore del mondo. Preghiamo perché ogni uomo, come la Vergine Maria, possa accogliere quale centro della propria vita il Dio che si è fatto Bambino, fonte della vera gioia.”

*Benedikto la 16-a - 2009*





Estratto dall'articolo

*"Natale nel mondo, dalla Thailandia all'Etiopia alle isole Salomone"*  
pubblicato sulla rivista Popoli e Missione il 21 Dicembre 2021

Eltiraĵo el la artikolo

*"Natale nel mondo, dalla Thailandia all'Etiopia alle isole Salomone"*  
eldonita en la revuo "Popoli e Missione" la 21-an de Decembro 2021

Aŭtorino: Chiara Pellicci

Esperantigis: F.Fagnani

## Tajlando, Kristnasko en la budhana lando. Sen la kripo sed kun la lumanta stelo

Thailandia, Natale nel Paese buddista.  
Senza presepe ma con la stella luminosa.

Patro Attilio De Battisti estas misiisto, kiu pasigis dekdu jarojn en Tajlando en diocezo Chiang Mai. En intervjuo publikita en revuo "Popoli e Missione" li rakontis la Kristnaskon en lando el budhana plejmulto.

La reklamoj, la filmoj, la komercaj centroj, la butikoj, la dekoracioj parolas nur pri boacoj, donacoj, Kristnaskaj Paĉjoj kaj neĝo (dum Kristnasko la temperaturo en Tajlando estas ĉirkaŭ 30 gradoj!). Tajlando estas lando kun religio kaj tradicio budhanaj. La katolikoj estas nur 0,5% de la loĝantaro kaj estas disigitaj precipe en la etaj vilaĝoj kamparaj kaj montaraj. La tajoj pensas, ke Kristnasko estas la festo de la naskiĝo de Kristnaska Paĉjo. Ankaŭ en la domoj de la katolikoj elstaras la lumantaj dekoracioj, oni vestiĝas kiel Kristnaska Paĉjo, oni atendas la donacojn.

Estas granda laboro por la misiistoj turni la atenton al Jesuo. Kaj tio estas peza afero ĉar ne ekzistas statuetoj de la kripo, ne estas libroj, kiuj parolas pri Jesuo, ne estas radikigintaj tradicioj, kantoj, ritoj. La paroĥoj

Padre Attilio De Battisti è un missionario che ha trascorso dodici anni in Thailandia nella diocesi di Chiang Mai. In un'intervista pubblicata sulla rivista "Popoli e Missione" ha raccontato il Natale in un paese a maggioranza buddista.

La pubblicità, film, centri commerciali, negozi e decorazioni parlano solo di renne, regali, babbi natale e neve (a Natale la temperatura in Thailandia si aggira sui 30 gradi!). La Thailandia è un Paese di religione e tradizione buddista. I cattolici sono solo lo 0,5% della popolazione e sono dispersi soprattutto nei piccoli villaggi rurali e di montagna. La gente thai pensa che il Natale sia la festa del compleanno di Babbo Natale. Anche nelle case dei cattolici primeggiano gli addobbi luminosi, ci si veste da Babbo Natale, si attendono i regali.

È un grande lavoro per i missionari spostare l'attenzione su Gesù. Ed è impegnativo dato che non esistono le statuine del presepio, non ci sono libri che parlino di Gesù, non ci sono tradizioni consolidate, canti, celebrazioni. Le

klopodas havi grandan kripon en la preĝejo (kiun eble oni sendas el Italio), pretigi iun reklaman panelon por afiŝi ĉe la krucvojoj aŭ en la lernejoj por rememorigi, ke temas pri la festo de Jesuo.

La 25a de Decembro eĉ ne estas festo en la tajlanda kalendaro kaj oni devas peti permeson al la lernejestroj por ebligi, ke la katolikaj studentoj restu hejme por partopreni en la celebradoj. Feliĉe, kutime la lernejestroj ebligas tiujn ĉi iniciatojn kaj ne kontraŭas ilin. Malgraŭ, ke oni ne sukcesas enkonduki la kripon en la familiojn (pro manko de rimedoj), tradicio, kiu iĝis preskaŭ ĝenerala estas tiu de la almeto de lumanta stelo (eble farita el papero kaj bambuo) sur la pordo de la domo.

Ankaŭ en la paroĥoj okazas paradoj, pli malpli solenaj, kun grandaj steloj, kiel memoro de la kometo de la kripo. En pluraj vilaĝoj, kien la pastro ne ofte iras, la katekistoj mem aŭ la gvidantoj de la preĝoj faras kristnaskan liturgion kun la levo de la stelo. Kristnasko estas kunigita kun la atendo ricevi donacojn, pro la fakto, ke dum tiu periodo ankaŭ la publikaj institucioj donacas litkovrilojn, ĉapelojn, puloverojn, gantojn, ŝtrumpojn, biskvitojn. La katolikoj mem scias, ke dum Kristnasko alvenas la bonfarantoj, la politikistoj, la industriistoj, la volontuloj de organizaĵoj kaj ankaŭ la religiaj institucioj por porti donac-paketojn al la infanoj aŭ al la maljunuloj.

Post la nokta meso de la 24-a aŭ de la 25-a de Decembro sekvas la paroĥa loterio kaj, kie eblas, komuna vespermanĝo. La misiistoj ĉiam klopodis diskonigi la signifon de Kristnasko: ili presigas libretojn aŭ foliojn por disdoni en la merkatoj aŭ en la renkontiĝlokoj de la homoj; ili elpensas manierojn por evidentigi la scenon de la Kristnasko kun la groto de Betlehemo aŭ kun la Infano Jesuo. Pretigi la kripon ekster la preĝejo kaj apud la strato altiras multegajn homojn kiuj, scivoleme, demandas kion la afero signifas, kaj restas ravitaj.

parrocchie si sforzano di avere un presepe grande in chiesa (magari spedito dall'Italia), di fare qualche cartellone pubblicitario da appendere sugli incroci o nelle scuole per ricordare che è la festa di Gesù.

Il 25 dicembre non è nemmeno festa nel calendario thailandese e si deve chiedere permesso ai presidi per permettere agli alunni cattolici di stare a casa per partecipare alle celebrazioni. Per fortuna, in genere, i presidi permettono queste iniziative e non oppongono resistenza. Nonostante non si riesca a introdurre il segno del presepio nelle famiglie (per mancanza di strumenti), una tradizione che è diventata quasi generale è quella di appendere una stella luminosa (magari fatta di carta velina e bambù) alla porta della casa.

Anche nelle parrocchie ci sono delle sfilate, più o meno solenni, con grandi stelle, a ricordo della cometa del presepio. In molti villaggi dove il sacerdote non arriva frequentemente, gli stessi catechisti o le guide della preghiera eseguono una liturgia natalizia con l'alza-stella. Il Natale è associato all'attesa dei regali perché proprio in quel periodo anche le istituzioni pubbliche donano coperte, berretti, maglioncini, guanti, calze, biscotti. Gli stessi cattolici sanno ormai che a Natale arrivano i benefattori, i politici, gli industriali, i volontari di organizzazioni e anche le istituzioni religiose a portare pacchetti ai bambini o agli anziani.


La messa notturna del 24 o del 25 dicembre è seguita dalla lotteria parrocchiale e, dove possibile, dalla cena comunitaria. I missionari hanno sempre cercato di far conoscere il significato del Natale: stampano piccoli libretti o foglietti da distribuire nei mercati o nei punti di ritrovo della gente; inventano modi per mettere in evidenza la scena del Natale con la grotta di Betlemme o con Gesù Bambino. Fare il presepio fuori dalla chiesa e vicino alla strada richiama moltissime persone che, curiose, chiedono cosa significhi e restano incantate.



# SANKTA MARIA BERTILLA BOSCARDIN

Ni lasu fari al la Sinjoro  
Lasciamo fare al Signore

Aŭtorino: Mirella De Martini



En la jarduo 2021-2022, okaze de la centjara datreveno de la morto de Sankta Bertilla, oni organizis en Viĉenco kaj en apudaj lokoj plurajn eventojn por memori ĉi tiun sanktulino, en Italio ŝajnas ankoraŭ malmulte konata. Atestoj pri ŝi troviĝas tamen nuntempe ne nur en Italio, sed ankaŭ en aliaj landoj, kiel videblas trafolumante la libron tiam eldonitan, kiu entenas multajn atestojn pri la spuroj en ligo kun la sanktulino tra la mondo: Lumaj irvojoj – Spuresploroj en ligo kun la nomo Sankta Bertilla, [Viĉenco] 2022. Ĉi sanktulino indas diskonigon ankaŭ tra la Esperanta mondo.

Eta sciigo pri ŝi jam aperis en *Katolika Penso*, n. 1, Oktobro 2023, p. 3, rilate la viziton de la kapelo, kie troviĝas la urno entenanta la mortemajn restaĵojn de la sanktulino, fare de partoprenintoj la 35-an jaran renkontiĝon de UECI, en Viĉenco. Tie ĝi troviĝas pro la fakto, ke la sanktulino estis monaĥino apartenanta al la ordeno de la monaĥinoj de Sankta Dorotea filinoj de la Sanktaj Koroj, fondita de sacerdoto Johano Antono Farina (1803-1888), same kiel Bertilla de Viĉenco-provinco devena.

La ordeno celis unue instruadon kaj edukadon de la popolaj tavoloj, ilin provizante per taŭga profesia preparo, sed poste al ĝiaj monaĥinoj oni konfidis ankaŭ la asistadon en la hospitaloj kaj kadukulejoj.

Anna Francesca Boscardin, tiu ĉi estis ŝia vera nomo, naskiĝis la 6-an de Oktobro 1888 en malriĉa kamparana familio en monteta vilaĝo Brendola. Tie ŝi pasigis la infanaĝon, baldaŭ montrante sian obeeman karakteron, sian

Nel biennio 2021-2022, in occasione del centenario della morte di santa Bertilla, si sono organizzati a Vicenza e in località vicine vari eventi per fare memoria di questa santa, a quanto sembra ancora poco conosciuta in Italia. Testimonianze su di lei si trovano tuttavia oggi non solo in Italia, ma pure in altri paesi, come si vede sfogliando dall'inizio alla fine il libro allora pubblicato, che contiene molte testimonianze sulle tracce legate alla santa diffuse per il mondo: Percorsi di luce – Ricerca delle tracce legate al nome di Santa Bertilla, [Vicenza] 2022. Questa santa merita di essere conosciuta anche nel mondo esperantista.

Un breve cenno su di lei è apparso su *Katolika Penso*, n. 1, ottobre 2023, p. 3, a proposito della visita alla cappella in cui si trova l'urna contenente i resti mortali della santa, da parte di partecipanti al 35° incontro annuale dell'UECI, a Vicenza. Essa si trova là per il fatto che la santa era una suora appartenente all'ordine delle Suore Dorothee dei Sacri Cuori, fondato dal sacerdote Giovanni Antonio Farina (1803-1888), come Bertilla originario della provincia di Vicenza.

L'ordine aveva inizialmente lo scopo di istruire ed educare gli strati più poveri e popolari, fornendo loro una valida preparazione professionale, ma in seguito alle sue suore venne affidata anche l'assistenza negli ospedali e negli ospizi.

Anna Francesca Boscardin, questo era il suo vero nome, nacque il 6 ottobre 1888 da una famiglia povera di contadini nel villaggio collinare di Brendola. Vi trascorse l'infanzia, rivelando presto la sua indole docile, il suo

detenigemon kaj sian religiemon.

Je la aĝo de 16 jaroj kaj duono, en 1905 ŝi eniris la ordonan instituton en Viĉenco, kie ŝi pasigis la sesmonatan provotempon kaj la unuan jaron de la dujara novictempo, kiam oni sendis ŝin al la hospitalo de Treviso.

Tie, laŭ decido de la superulino, kiu konsideris ŝin nekapabla surpreni pli gravajn taskojn, ŝi laboris kiel kuireja helpantino.

Post la ordinado, okazinta en Viĉenco la 8-an de Decembro 1907, kiam ŝi alprenis la nomon Maria Bertilla (sed ĉiuj nomos ŝin simple Bertilla), ŝi restadis en Treviso dum preskaŭ 15 jaroj, krom en Oktobro 1908 por flegi sian 42-jaran mortantan patrinon kaj en la periodo inter la fino de 1917 kaj la fino de 1918, por daŭrigi labori en Viggiù (Varese).

Ŝi restus ĉiama kuirhelpantino, ĉar taksata kiel “anserino”, ne inteligenta kaj mallerta naivulino, se ne furiozus tiutempe en tiuj lokoj diferio, kontaĝa malsano, pro kiu multaj infanoj estis enhospitaligitaj. Mankis flegistino, tial estis sendita al tiu sekcio Bertilla. Rilate al la malsanuloj, tuj ŝi aperigis siajn dotojn de senfina pacienco, kuraĝigo, sed precipe de abnegacio, multege laborante kaj preĝante, nezorgante pri si mem, multfoje sen manĝi kaj sen dormi.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, monaĥino Bertilla sin dediĉis al la asisto de la enhospitaligitaj soldatoj, kiujn ŝi ankaŭ akompanis poste al Viggiù, ĉar sekve de la disfuĝo de Kobarido, tien oni delokis, en la tiaman hotelon “Prealpi”, parton de la Trevisohospitalo (ŝi flegis la tuberkulozulojn).

En la sekcioj de la hospitalo en Treviso, hodiaŭ universitata konstruaĵo, Bertilla daŭre laboris ĝis kelkaj tagoj antaŭ sia morto. Tie ŝi estis akirinta profesian kvalifikon de flegistino, post specifa kurso. Ŝi forpasis en



Paroĥa preĝejo de Sankta Maria Bertilla Boscardin en Viĉenco: detalo de la ligna skulptaĵo de Bruno Vedovato “S. Maria Bertilla” (foto de M. De Martini, farita la 19-an de Aprilo 2023).

essere schiva e la sua religiosità.

A 16 anni e mezzo, nel 1905 entrò nell’istituto dell’ordine a Vicenza, dove trascorse i sei mesi del probandato e il primo dei due anni del noviziato, allorché venne inviata all’ospedale di Treviso.

Qui, su decisione della superiora, che la ritenne incapace di assumere incarichi più impegnativi, lavorò come sgattera.

Dopo l’ordinazione, avvenuta a Vicenza l’8 dicembre 1907, quando assunse il nome di Maria Bertilla (ma tutti la chiameranno semplicemente Bertilla), rimase a Treviso quasi 15 anni, eccetto che nell’ottobre 1908 per assistere a Vicenza la madre quarantaduenne moribonda, e nel

periodo tra la fine del 1917 e la fine del 1918, per continuare a lavorare a Viggiù (Varese).

Sarebbe rimasta un’eterna sgattera, perché ritenuta un’oca, un’ingenua poco intelligente e incapace, se all’epoca non infuriasse in quei luoghi la differite, malattia contagiosa, a causa della quale venivano ricoverati molti bambini. Mancava un’infermiera, perciò a quel reparto venne mandata Bertilla. Nei confronti degli ammalati manifestò subito le proprie doti di infinita pazienza, incoraggiamento, ma soprattutto di abnegazione, lavorando e pregando moltissimo, incurante di sè, spesso senza mangiare e senza dormire.

Quando scoppiò la prima guerra mondiale, suor Bertilla si dedicò all’assistenza dei soldati ricoverati, che accompagnò poi anche a Viggiù, poiché in seguito alla rotta di Caporetto venne trasferita là, nell’allora hotel “Prealpi”, una parte dell’ospedale di Treviso (lei curava i tubercolotici).

Nei reparti dell’ospedale di Treviso, oggi edificio dell’università, Bertilla continuò a lavorare fino a qualche giorno prima della sua morte. Vi aveva conseguito la qualifica professionale di infermiera, al termine di uno

odoro de sankteco la 20-an de Oktobro 1922, pro kancero, kaj estis entombigita en la tombejo en Treviso.

Baldaŭ homoj ekvizitis la tombon por danki al Bertilla kaj preĝpeti ŝian propetadon. La devoteco al ŝi disvastiĝis de Venetio ĝis eksterlando, precipe en Ameriko kaj Aŭstralio, pro impulso de la elmigrintoj. Post nur tri jaroj, la loka episkopo Longhin decidis malfermi la informan proceson por la agnosko de ŝiaj virtoj. Ŝi estis beatproklamita de papo Pio la 12-a la 8-an de Junio 1952, kaj sanktproklamita de papo Johano la 23-a la 11-an de Majo 1961 (la fondinto de ŝia ordeno, Johano Antono Farina, episkopo, estos sanktulo en 2014).

Sankta Bertilla postlasis, herede al ni, sian grandegan amon al Dio, de ŝi efektivigitan pere de grandega proksimumo. En la signifa libreto de A. Chiades, Sankta Maria Bertilla "Ni lasu fari al la Sinjoro" (Elledici, eldonejo Velar, 2010) estas cititaj kelkaj frazoj skribitaj en ŝiaj taglibroj, kaj esprimoj, kiujn ŝi kutimis diri. Ili ankaŭ atestas ŝian konfidon al Dio per tuteca amo.

Ŝia kulto disvastiĝis tra la mondo ankaŭ dank'al la ĉeesto de la monaĥinoj de Sankta Dorotea filinoj de la Sanktaj Koroj, sed ĉefe dank'al la konkreta ekzemplo de sankteco, elvivita de Bertilla en absoluta sinofero al Dio, kun humileco, ĉiam flanke de la suferanta homaro, inkluzive de la infanoj, pri kiuj ŝi estis aparte zorgema, dum sia tuta mallonga surtera ekzisto.



Cattedrale di Vicenza: bassorilievo in bronzo a forma di ruota di carro "Santa Maria Bertilla" di Franco Mastrovita (2001). Richiama il cammino spirituale della santa, con l'immagine da lei stessa offerta "Io vado per la via dei carri", intendendo la via comune, la più umile ma non la più facile (foto di M. De Martini, 10. 10.2022).

Katedralo en Viĉenco: bronza bareliefo en la formo de ĉara rado "Sankta Maria Bertilla" de Franco Mastrovita (2001). Ĝi memorigas la spiritan irvojon de la sanktulino, per la imago, kiun ŝi mem donis al ni dirante "Mi iras laŭ la vojo de la ĉaroj", t.e. la ordinara vojo, la plej humila sed ne la plej facila (foto de M. De Martini, farita la 10-an de Oktobro 2022).

specifico corso. Morì in odore di santità il 20 ottobre 1922, di cancro, e fu sepolta nel cimitero di Treviso.

Ben presto le persone cominciarono a visitare la tomba per ringraziare Bertilla e invocare la sua intercessione. La devozione a lei si propagò dal Veneto fino all'estero, specie in America e Australia, per impulso degli emigranti. Dopo soli tre anni, il locale vescovo Longhin decise di aprire il processo informativo per il riconoscimento delle sue virtù. Venne proclamata beata da Papa Pio XII l'8 giugno 1952 e santa da Papa Giovanni XXIII l'11 maggio 1961 (il fondatore del suo ordine, Giovanni Antonio Farina, vescovo, sarà santo nel 2014).

Santa Bertilla ci ha lasciato in eredità il suo immenso amore a Dio, da lei realizzato mediante l'immenso amore verso il prossimo. Nel significativo libriccino di A. Chiades, Santa Maria Bertilla "Lasciamo fare al Signore", (Elledici, editrice Velar, 2010) sono riportate alcune frasi scritte nei suoi diari ed espressioni che era solita dire. Anch'esse attestano il suo affidarsi a Dio con amore totale.

Il suo culto si è diffuso nel mondo anche grazie alla presenza delle Suore Dorotee dei Sacri Cuori, ma principalmente grazie al concreto esempio di santità, vissuta da Bertilla nella completa dedizione a Dio, sempre al fianco dell'umanità sofferente, inclusi i bambini, verso i quali rivolse un'attenzione particolare, durante l'intera sua breve esistenza terrena.

## Renkontiĝo ĉe Castelpetroso en Molizo

## Incontro a Castelpetroso in Molise

Aŭtoro: Raffaele Del Re



La 2-an de Junio 2023 deko da membroj kaj amikoj de UECI, el Molizo kaj Latio, renkontiĝis ĉe la Sanktejo de la Dolorplena Patrino en Castelpetroso apud Isernia, celante kune pasigi tagon de preĝo, socia kunvivado kaj Esperanta kulturo.

Tiuj, kiuj alvenis ĝustatempe, povis partopreni meson je la 10:30 en la baziliko, mirinda novgotika monumento kun nekutima plano. Poste la grupo ekmarŝis direkte al la Kapelo de la Aperoĵoj, eldirante laŭ la vojo la tradician preĝon de la Sep Doloroj (Esperante) kun paŭzoj, post ĉiu doloro, por babili, foti, admiri la pejzaĝon. La kunportitaj manĝaĵoj estis konsumitaj en amikema etoso ĉe la antaŭmendita ejo, dum tempo iom pli longa ol tiu planita pro la plezuro de la babilado. Komenciĝis poste la kultura parto, kun paroladoj mallongaj kaj neformalaj, kies suma daŭro estis nur iom pli longa ol unu horo.

Post la enkonduko de pastro Francis Tiso, Raffaele Del Re prezentis kvar pecojn de parolado de Zamenhof koncerne la “internan ideon”, kaj Antonio De Cristofaro parolis pri la minoritataj lingvoj en Italio, inter kiuj – en Molizo – la albana kaj la kroata alportitaj ĉi tien de refuĝintoj alvenintaj en la Mezepoko. La debaton partoprenis aktive preskaŭ ĉiuj la ĉeestantoj. La partoprenintoj lasis unu la alian ĉirkaŭ je la 17:30, kun la emo refari tiun sperton ankaŭ venontjare.

Il 2 giugno 2023 una decina di soci Ueci e simpatizzanti del Molise e del Lazio si sono incontrati presso il Santuario dell’Addolorata di Castelpetroso, vicino a Isernia, per una giornata di preghiera, socialità e cultura esperantista.

Chi è arrivato in tempo ha potuto partecipare alla messa delle 10:30 nella basilica, splendido monumento neogotico dall’insolita pianta. Poi il gruppo si è incamminato verso la Cappella delle Apparizioni, recitando lungo la via la tradizionale preghiera dei Sette Dolori (in esperanto), con pause, dopo ciascun dolore, per le chiacchiere, le foto, i panorami. Il pranzo al sacco, consumato in atmosfera cameratesca nei locali prenotati, s’è un po’ dilungato per il piacere della conversazione. Poi si è passati alla fase culturale, con interventi brevi e informali e una durata complessiva di poco più di un’ora.

Dopo l’introduzione di don Francis Tiso, Raffaele Del Re ha proposto quattro passi di un discorso di Zamenhof riguardante la “interna ideo” e Antonio De Cristofaro ha parlato delle lingue minoritarie in Italia, rappresentate in Molise dall’albanese e dal croato portati qui dai profughi arrivati nel Medioevo. Il dibattito ha visto la partecipazione attiva di quasi tutti i presenti. I partecipanti si sono lasciati verso le 17:30 con il desiderio di ripetere l’esperienza anche l’anno prossimo.



**V**era amikeco rezistas al la tempo,  
distanco kaj silento.

La vera amicitia resiste al tempo, alla distanza  
e al silenzio.

Isabel Allende

Nia membro Arturo Bau, 95-jara, iris al la  
tombo de Gianni kaj Mariolina Conti en la tago  
de la mortintoj.

“Kara Prezidantino, mi sendas al vi ĉi tiun  
foton memore al Gianni, senlaca esperantisto  
kaj mia Esperanto-instruisto. La fama tombo  
desegnita de Gianni ankoraŭ ne estis lokita en  
la tombejo de Kormano sed lia filino certigis al  
mi, ke ĝi estos lokita baldaŭ.”

Il nostro socio Arturo Bau, 95 anni, è andato sulla tomba di Gianni e Mariolina Conti nel  
giorno dei morti.

“Cara Presidente ti invio questa foto a ricordo di Gianni, un infaticabile esperantista e  
mio insegnante di Esperanto. Ancora non è stata collocata nel cimitero di Cormano la fa-  
mosa tomba progettata da Gianni, ma la figlia mi ha assicurato che verrà posta a breve.”



## INTERNACIA ASOCIO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ (IABE)

La kongreso de IABE, kiu okazis en San Benedetto Del Tronto je la komenco de Junio, estis  
mia unua kongreso. Mi estis tre scivolema pri ĉituj eventoj, ĉar mi ofte aŭdis pri ili, tamen mi  
ne imagis kiel povis esti la sperto vivi tuttempe en la Esperanta komunumo kaj kunpartigi la  
belegan internacian lingvon kun aliaj samideanoj. Ĝi estis oportuno por renkonti blindulojn kaj  
vidantajn esperantistojn el la tuta mondo kaj kunpartigi kun ili opiniojn, rakontojn, ideojn,  
spertojn pri la tuttaga vivo kaj pri la vivo en la Esperanta movado. Kun ili, mi kunpartigis ankaŭ  
prelegojn, kursojn, koncertojn kaj konferencojn pri multaj interesaj temoj. Ĝi estis ankaŭ la  
okazo por viziti la tre interesan muzeon “Omero” en Ancona. Mi havas belegan memoron pri  
tiu sperto, pri la sentoj de aparteno kiujn ĝi donis al mi, pri la novaj geamikoj kiujn mi ekkonis,  
kaj pri la belaj spertoj kaj rilakso en belega itala turisma urbeto ĉe la adriatika marbordo.

Marco Schiera



I tre giorni della Merla

# La tri tagoj de La Merlino

Antaŭ longa tempo en Milano estis tre severa vintro.

Neĝo falis de la ĉielo, kaj kovris la tutan urbon, la stratojn, la ĝardenojn.

En ĝardeno de vilao, sur la branĉoj de arbo, estis nesto de malgranda familio de merloj, kiuj havis plumojn blankaj kiel neĝo.

Estis la patrino, la patro, kaj tri etaj merlidoj, naskitaj post la somero.

La familio suferis pro la malvarmo, kaj penis por trovi kelkajn panerojn por satiĝi.

Post kelkaj tagoj la patro alprenis decidon, kaj diris al la edzino:

«Ĉi tie oni trovas nenion por manĝi, ni ĉiuj mortos pro malsato kaj malvarmo. Mi havas ideon, mi helpos vin transloki la neston sur la tegmenton de la vilao, en la kamensupro.

Dum vi atendas mian revenon, vi ne sentos malvarmon. Mi foriros, kaj serĉados nutraĵon, kie la neĝo ankoraŭ ne estas».

La patro foriris. La patrino, kaj la etaj merlidoj restis en lanesto la tutan tagon.

Post tri tagoj la patro, reveninte hejmen, preskaŭ plu ne rekonis sian familion. La nigra fumo, eliranta de la kamensupro, nigrigis ĉiujn plumojn de la birdetoj!

De tiu tago ĉiuj merloj naskiĝas kun nigraj plumoj.

Por memorigi la familion de blankaj merloj, kiuj fariĝis nigraj, la lastaj tri tagoj de la monato Januaro estas nomataj: la tri tagoj de la Merlino.

Tanto, tanto tempo fa a Milano ci fu un inverno molto rigido.

La neve scendeva dal cielo e copriva tutta la città, le strade, i giardini.

In un giardino di una villa sui rami di un albero c'era un nido di una famigliola di merli, che avevano le piume bianche come la neve.

C'era la mamma, il papà e tre piccoli uccellini, nati dopo l'estate.

La famigliola soffriva il freddo e stentava a trovare qualche briciola di pane per sfamarsi.

Dopo qualche giorno il papà prese una decisione e disse alla moglie:

«Qui non si trova nulla da mangiare, moriremo tutti di fame e di freddo. Ho un'idea, ti aiuterò a spostare il nido sul tetto del palazzo, nel comignolo.

Mentre aspettate il mio ritorno non avrete freddo. Io partirò e andrò a cercare il cibo dove la neve non è ancora arrivata».

Il papà partì. La mamma e i piccoli uccellini stavano tutto il giorno nel nido.

Dopo tre giorni il papà tornò a casa e quasi non riuscì più a riconoscere la sua famiglia. Il fumo nero che usciva dal comignolo, aveva colorato di nero tutte le piume degli uccellini!

Da quel giorno tutti i merli nascono con le piume nere.

Per ricordare la famigliola di merli bianchi divenuti neri, gli ultimi tre giorni del mese di gennaio sono detti: i tre giorni della Merla.

# RINNOVO DEL COMITATO CENTRALE 2024/2027

La presidente Tiziana Fossati

Nel 2024 UECI dovrà rinnovare il Comitato Centrale. Dopo la traumatica morte di Giovanni Daminelli, con il compianto Gianni Conti e F. Fagnani, si è svuotato lo studio di Daminelli e portato tutti gli scatoloni nella mia dimora e in quella di Gianni Conti. In seguito, causa l'indisponibilità di Conti a conservare ulteriormente il materiale appartenente a UECI presso il suo magazzino, si è deciso di alienare la Biblioteca "Gluco Corrado" donando i volumi alla Biblioteca Statale di Cremona e alla Biblioteca Nazionale dell'esperanto di Massa. Attualmente tutto il materiale (libri invenduti, documenti amministrativi ecc.) si trova presso la mia abitazione.

Da allora il socio Raffaele del Re ha curato l'aggiornamento del sito. Sono stati organizzati tre Congressi: a Brescia, Loreto e Vicenza. La partecipazione non è stata buona perché la sospensione causata dal Covid e la contemporanea scomparsa o l'età avanzata di quegli associati che partecipavano solitamente ai congressi hanno assottigliato il numero dei partecipanti.

Katolika Sento è diventata trimestrale sia per l'aumento del costo della stampa e dell'IVA (la rivista non ha il codice ISSN che permette la tariffa agevolata per le pubblicazioni) sia perché UECI non ha avuto le forze per far fronte a una scadenza bimestrale. Grazie all'aiuto del socio Eros Bottinelli, KS è molto migliorata graficamente e, sempre grazie alle sue conoscenze, è stato possibile coinvolgere

nella scrittura degli articoli personalità importanti del mondo cattolico. Il periodo del Covid ha significato per l'Associazione la scoperta dell'utilità delle piattaforme Zoom e Skype. Molto si è lavorato per abituare i soci che lo desideravano all'uso di questi strumenti che ci hanno permesso di avere contatti con esperantisti di tutto il mondo. Penso, ad esempio, alla recita del Santo Rosario serale che vede la partecipazione di soci UECI e non con esperantisti di tutto il mondo oppure alla partecipazione ai *Virtualaj tagoj* durante i quali alcuni nostri soci hanno tenuto delle conferenze. Quali saranno i problemi su cui lavorare nei prossimi anni? In primo luogo la sistemazione dei problemi amministrativi e burocratici della nuova rivista Katolika Penso che ha sostituito la precedente la cui registrazione al Tribunale comportava problemi legali. La necessità di aggiornare lo Statuto, ormai obsoleto. La riorganizzazione del sito sulla base delle nuove indicazioni che scaturiranno dallo Statuto. Il coinvolgimento dei soci per mezzo di collegamenti telematici, ora riservati solo ai membri del Comitato centrale. UECI ha uno spazio all'interno del mondo esperantista italiano, nonostante la grave crisi che tutte le piccole associazioni devono affrontare sia per problemi burocratici sia per il cambiamento culturale e sociale in atto presso le nuove generazioni che sono riluttanti a farsi coinvolgere nelle realtà associative.

Chi desidera candidarsi per il Comitato Centrale  
è pregato di scrivere a: [katolika.sento@ueci.it](mailto:katolika.sento@ueci.it)

# KATOLIKA PENSO

Aperiodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana fondata nel 1920

## REDAZIONE

**Redazione:** Via F. Filzi 30/A, 20851 Lissone (MB)

**Contatti:** tel. +39 039464942 - <http://www.ueci.it> - [katolika.sento@ueci.it](mailto:katolika.sento@ueci.it)

Finito di stampare in dicembre 2023 presso Centro Grafico Pirola - Lissone

## QUOTE ASSOCIATIVE

sigla <b>SO</b>	Associato ordinario solo UECI	con KP	€ 22,00
sigla <b>SG</b>	Associato giovane solo UECI	con KP	€ 11,00
sigla <b>SF</b>	Associato familiare solo UECI	senza KP	€ 11,00
sigla <b>SS</b>	Associato sostenitore solo UECI	con KP	€ 44,00
sigla <b>SR</b>	Associato religioso solo UECI	con KP	€ 0

È possibile, con un contributo di 10 €, ricevere per un anno solo questa pubblicazione senza associarsi (sigla **AK**).

## QUOTE ASSOCIATIVE UECI + IKUE

sigla <b>SO+MA</b>	Associato ordinario	con KP ed EK (cartacea)	€ 47,00 (22+25)
sigla <b>SO+MB</b>	Associato ordinario	con KP ed EK (digitale)	€ 34,50 (22+12,5)
sigla <b>SG+MJ</b>	Associato giovane	con KP ed EK (cartacea)	€ 23,50 (11+12,5)
sigla <b>SG+AMJ</b>	Associato giovane	con KP ed EK (digitale)	€ 17,25 (11+6,25)
sigla <b>SF+MF</b>	Associato familiare	senza KP ed EK	€ 17,25 (11+6,25)

Solo abbonamento a Espero Katolika: € 25,00 cartaceo - € 12,50 digitale

*Per i versamenti su conto corrente postale:*

n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.

IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 — BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Nella causale specificare:*

1) Categoria dell'associato; 2) anno di nascita per i giovani; 3) esatto indirizzo per il recapito; 4) destinazione di eventuali offerte.

Si ringrazia per la disponibilità:

Popoli e Missione

Bernadette Lopez ([www.evangelie-et-peinture.org](http://www.evangelie-et-peinture.org) / [www.bernalopez.org](http://www.bernalopez.org))

Tutti i diritti (testi, immagini, grafica, layout ecc.) presenti in questa pubblicazione appartengono ai rispettivi proprietari.